

Denove pri religia (mal)toleremo

Pasintan semajnon, en mia artikolo pri “Religia (Mal)Toleremo”, en kiu mi nomis kelkajn pasintecajn kaj nuntempajn religiajn konfliktojn, mi forgesis unu grandan kaj gravegan: tiu inter hinduoj kaj islamanoj en Hindio dum la 1940-aj jaroj. Mi ne volas detali tion, sed nur fari mallongan resumon:

Tiutempe plejmultaj hindoj estis hinduoj, sed ekzistis granda malplimulto da islamanoj, kiuj jam en la 1930-aj jaroj postulis por si apartan ŝtaton. Kiam Hindio iĝis sendependa en 1947, okazis apartiĝo; fakte estis kreitaj du islamaj ŝtatoj: Pakistano okcidente kaj Bangladeŝo oriente. Post la apartiĝo necesis, ke la islamanoj foriru el Hinda Unio (Barato) kaj ke hinduoj foriru el Pakistano kaj Bangladeŝo. Tiel estiĝis unu el la plej grandaj movoj de forpeladoj kaj fuĝoj en la historio de la homaro. Estis forpelitaj proksimume 10 milionoj da hinduoj kaj sikoj el Pakistano (sen kalkuli tiujn de Bangladeŝo), kaj 7 milionoj da islamanoj el la Hinda Unio. Mortis inter 750.000 kaj unu milionoj da homoj. [Laŭ la germanlingva Vikipedio]

En la listo de religiaj konfliktoj kiun mi montris, videblas ke ofte temas pri konfliktoj inter islamanoj kaj kredantoj de aliaj religioj. Mi menciis ankaŭ, ke islamaj fanatikuloj celas disvastigi Islamon pere de terorismo.

En la interreto ekzistas multegaj paĝoj pri religia libereco kaj toleremo en Islamo. Mi aliris kelkajn en la angla, franca, germana kaj portugala. En la germana troviĝas ekzemple longa vikipedia artikolo, en la portugala ekzistas magistriga disertacio de 2018 titolita “Toleremo kaj religia libereco en Islamo”. En ĉiuj tiuj tekstoj oni prezentas faktojn aŭ/kaj opinias aŭ/kaj interpretas la Koranon. Evidente mi ne povas resumi ĉion tion ĉi tie.

Tamen mi volas atentigi pri la retejo de la *Religious Freedom Institute* [Instituto pri Religia Libereco] en kiu ekzistas paĝo de “*Islam and Religious Freedom Action Team*” [Agada Teamo pri Islamo kaj Religia Libereco], sur kiu estas dirita i.e. jeno: “[La teamo] esploras kaj apogas religian liberecon el la vidpunkto de la islamaj tradicioj. La laboro inkluzivas esplorojn pri la tradicioj de Islamo, disvolvado de edukaj programoj pri Islamo kaj religia libereco, [...]”. Sur tiu paĝo troviĝas kelkaj artikoloj, filmetoj kaj aliaj tekstoj pri tiu temo. I.a. estas longa prelego de D-ro Abdullah Saeed, aŭtoro de diversaj libroj kaj multaj artikoloj pri Islamo kaj pri kiu legeblas en Vikipedio, ke “li estas aparte konata pro siaj modernaj ideoj pri religia libereco en Islamo”. Ke ekzistas religia libereco en Islamo li provas pruvi en la (anglalingva) prelego. Ankaŭ sur la menciita retpaĝo estas liaj jenaj frazoj: “Malgraŭ la multaj limigoj kiuj estiĝis por islamanoj kaj ne-islamanoj dum la disvolviĝo de la islamaj teologio kaj juro en la post-profeta periodo [t.e. post la morto de Mohamedo], la realaĵoj de la moderna mondo devigas islamajn pensulojn kaj esploristojn repensi tiajn limigojn kaj argumenti favore al religia libereco por ĉiuj. Farante tion tiuj islamanoj alproksimiĝas al la instruoj de la Korano kaj al la fakta praktiko de Profeto Mohamedo.”

Nun mi mencias mallonge du periodojn en kiuj ekzistis relativa religia toleremo en pasintecaj islamaj regnoj.

Hispanio

En la bona artikolo “Al-Andalus” de la E-Vikipedio estas dirita i.a. jeno:

Al-Andalus [...] estis la araba nomo de la parto de Iberio regata de islamanoj de 711 ĝis 1492. [...]

La andalusa socio estis el tri ĉefaj grupoj: islamanoj, kristanoj kaj judoj. [...] La mozaraboj estis

kristanoj kiuj longe vivis sub islamana regado, kaj alproprigis multajn arabajn kutimojn, artojn kaj vortojn, dum ili konservis antikvajn kristanajn ritojn kaj propran latinidan lingvon. Ĉiu el tiuj komunumoj loĝis en aparta kvartalo de la urboj. [...]

La mozaraboj kaj la judoj havis liberecon de kulto, sed pro tiu libereco ili devis pagi du tributojn [...]. Tiuj du komunumoj havis proprajn aŭtoritatojn, ĝuis vojaĝliberecon, kaj rajtis esti juĝitaj laŭ sia leĝaro. Ili estis sub [kelkaj] limigoj, [i.a.] la viroj ne povis edziĝi kun islamano; ili ne rajtis havi islamajn servistojn.

Hindio

Ankaŭ en la E-Vikipedio troviĝas bona artikolo pri la islama mogola imperiestro Akbar la Granda (1542-1605). Vidu la parton pri religia toleremo:

Por multaj baratanoj, la titolo "la Granda" ne nur rilatis al la militaj kaj administraj kvalitoj de Akbar, sed ankaŭ al lia religia toleremo por ke ĉiu subulo en lia lando povu sperti sian propran religion. Eble en la espero kaj fido atingi religian unuecon ene de sia imperio, Akbar promulgis Din-i-Ilahi, nome sinkretisma kredo derivita el Islamo, Hinduismo, Zoroastrismo, kaj Kristanismo. [...]